

RAJECKÉ TEPLICE



Rajecké Teplice situas proksime de landlimo inter Ĉeĥa kaj Slovaka respublikoj norde de la urbo Rajec. Rajecké Teplice estas banloka urbeto, fondita ĉirkaŭ la jaro 1376, kaj ĝi apartenis al bieno Lieta-va. La unua banloko estis konstruita dum regado de la familio Thurcovy kaj uzis por kuracado alkalajn termofontojn. En la urbo indas viziti ankaŭ ŝatatan publikan termobanejon.

Supermara alto estas 415 metroj, pliaj informojn eblas trovi en: www.skonline.sk

Muzeo de trafiko en konstruaĵo de fervoja haltejo

Historion de trafiko ekde antikva tempo ĝis nuntempo montras Muzeo de trafiko Rajecké Teplice, kiun malfermis la 11an de aprilo 2014 Považské muzeo en konstruaĵo de fervoja haltejo Rajecké Teplice. Ideo konstrui muzeon de trafiko laŭ historiisto de Považské muzeo, kaj samtempe aŭtoro de la projekto Peter Šimko, naskiĝis en la jaro 2009 kaj en tempo de 110-a datreveno de la fervoja linio Žilina – Rajec. La konstruaĵo de la fervoja haltejo jam dum kelkaj jaroj ne estis uzata, sed estis rekonstruita kaj stacia halo fariĝis ideala spaco por instalo de trafikaj elmontraĵoj. „Ekde la jaro 2010 ni serĉis monrimedojn por adapti spacojn por la muzeo, kaj aĉeto de elmontraĵa materialo. Tiujn ni sukcesis ricevi nur en la jaro 2013 danke al subtemo de Ministerio por kulturo de Slovaka respubliko, kaj per donacoj de la subtenantoj“, diris Šimko.



Vizitantoj en la nove malfermita muzeo interkonatiĝas kun historio de trafiko ekde pratempo, tra mezepoko ĝis tempo, kiam oni konstruis kaj komencis ekspluati fervojojn. „Ni forgesas nek aŭtomobilan trafikon. Estas tie ĉi dudimensiaj kaj tridimensiaj elmontraĵoj. Tiuj tridimensiaj estas instalitaj plejparte en elmontraĵo de malnova fervoja stacio, antaŭ kiu parkadas motorcikloj. Ene estas videbla malnova tekniko, kiu iam sur la fervojo estis uzata. Infanoj ŝatas vidi miniaturan trakaron kun siatempa trajno kaj konstruaĵoj, kiuj montras fervojnodon Žilina en 1920-aj jaroj“, informis la aŭtoro de la projekto „Muzeo de trafiko“ dun inaŭguro de la muzeo.

Kiel rimarkigis urbestro de Rajecké Teplice Petr Dobeš, la Muzeo de trafiko estis inaŭgurita en la jaro de 25a datreveno de honorigo – transdono de Urba statuto al Rajecké Teplice kaj 115-a datreveno de ekspluat-apertigo de la fervoja linio Košice – Bohumín kun deturna branĉfervojo Žilina – Rajec. Rajecké Teplice estas baneja urbo kaj estas ĝojiga por mi, ke banejaj gastoj, kiuj vizitos nin, havas eblon viziti tiun ĉi ekspozicion. Tiu ĉi stando certe pliriĉigas nian urbon“, konstatis Dobeš. Projekto de Muzeo de trafiko estas kunfinancata el Monsubtena sistemo de Ministerio de la kulturo de Slovaka respubliko, el fondusoj de la memstara regiono Žilina, kaj de Považské muzeo en Žilina.

La vizitantoj en Muzeo de trafiko Rajecké Teplice spektos laŭnaturen fervojlinion, majstran motordrezinon, teknikon uzatan sur fervojo en estinto, aŭ elmontron de historia trafikreĝejo. Infanzitantoj eblas ludi kun historia miniatrakaro. Ĉion akompanas multa dumezura bildmaterialo, kiu helpas al vizitanto mallongtempe interkonatiĝi kun evoluo de trafiko en tuta Slovakio. Aŭtoroj de la projekto forgesis nek regionajn specialaĵojn, malgraŭ ke multaj akiritaj ekspoziciaĵoj devenas ĝuste el loka fervoja linio Žilina – Rajec. En la muzeo mankas nek uniformoj, akompana teksto de la lektoro, kaj funkcieblaj estas ankaŭ iuj malnovaj maŝinoj kaj instalaĵoj. Ĉiujare sur la fervoja linio Rajec – Teplice porokaze estas trafikataj ankaŭ historiaj trajnoj, kiel okazadas ekde la jaro 2013 en kadro de la aranĝo „Rajecká Anča“. Kiel kutimas en Slovakio, neniu verko aperas sen persona entuziasmo kaj oferoj de la aŭtoroj de la ideo. Ankaŭ fare de la ŝtato monsubtenata institucio. Oni tamen dankas nome al ĉiuj, kiuj senprofite helpis por realigo de la muzeo, ne nur materiale, sed eĉ per simpla subteno de la ideo. Samtempe oni petas kiel ajn subtenon kaj rekonos interesiĝon de privataj kolektantoj donaci aŭ pruntedoni al ni pliajn ekspozicieblajn objektojn.

Pri Muzeo de trafiko



La ideo konstrui Trafikan muzeon en Žilina kaj ĉirkaŭaĵo aperis jam en 1970-aj jaroj. Žilina estas ekde pratempo veturkruciĝejo, kaj post konstruo de regiona fervojo Žilina – Rajec ĝi fariĝis ankaŭ elstara fervojnodo. Translokiĝis ĉi tien Trafika altlernejo kaj aliaj institucioj, kies studtemo estas trafiko. Pro tio en Považ-

ské muzeo en Žilina estis sisteme kreata kaj kompilata kolekto de ekspoziciaĵoj el sfero historio de trafiko. Pro politikaj cirkonstancoj en 1980-aj jaroj, kaj post la jaro 1989 evoluo en tiu ĉi sfero estis malintensigita, la ideo konstrui muzeon de trafiko tamen daŭris plu. Rekte en Žilina ja mankis kaj ankoraŭ mankas konvenaj spacoj por muzea ekspozicio (estas pripensata translokiĝo de lokomotivejo en Žilina, kaj kreo de muzea kvartalo, kuniganta lokomotivejon kaj kastelon Budatín).

Ekspozicio de la muzeo konsistas el tri partoj:

Promeno tra historio de trafiko ekde pratempo ĝis nuntempo

La plej gravaj faktoj pri historio de ŝosea, surakva kaj fervoja trafikoj en Slovakio

Dudimensiaj kaj tridimensiaj eksponaĵoj rakontas pri pratempaj, mezepokaj kaj novtempaj veturoj, flosado, vaporŝipoj sur Danubo, konstruado de fervojoj, evoluo de fervoja tekniko, lokomotivoj kaj vagonoj, kaj pri aŭtomobilismo en 20-a jarcento.

Miniaturfervoja trakaro

Trakaro en dimensio HO (1:87) bildigas en simpligita analogiaĵo (dimensio) fervojnodon Žilina en 1920-aj jaroj.



Drama elmontraĵo de historia fervoja stacio



Elmontraĵo de laborejo de vendisto de vojaĝbiletoj, trafikgvidanto, trakserva drezino kaj miniaturo de parto de la stacidomo (pasaĝeroj) de IV-a klaso de loka fervojo en stilo de Hungaraj Reĝaj Ŝtataj Fervojoj el jaro 1880. Antaŭ la stacidomo staras „parkantaj“ motorcikloj. Kompletigita de multaj detaloj.

Preparis Jindřich Tomášek, grafike aranĝis Ladislav Kovář, fotoj – posedaĵo de Považské múzeum v Žiline